**Kunveno: merkredon la 20an de majo 2026a je la 20:00 h. en:**
***"De Uitwijk",***
***Generaal Pattonlaan 124,***
***Eindhoven.***
***Tel. 040 - 245 0590.***

# Koloraj rakontoj

Jam kelkfoje Rob prezentis al la klubo *kolorajn rakontojn*: tiuj estas enigmoj pri diversaj temoj. Komence tiu serio enhavis nur nigrajn rakontojn. Intertempe la elekto iĝis pli granda: ne nur aperis pli da nigraj rakontoj, sed ekzistas nun ankaŭ aliaj koloroj. La kolekto ampleksas nun *inter alie*:

- **Nigraj** rakontoj: Pri morto (intenca aŭ... ne), kaj aliaj fatalaj kazoj.
- **Blankaj** rakontoj: Pri fantomoj kaj aliaj supernaturaj estaĵoj.
- **Oranĝaj** rakontoj: Pri ferioj kaj vojaĝoj.
- **Flavaj** rakontoj: Varmaj enigmoj pri dezerto kaj prerio.
- **Verdaj** rakontoj: Pri naturo (bestoj kaj arboj/plantoj).
- **Bluaj** rakontoj: Malsekaj enigmoj pri maroj kaj akvo-veturado.
- **Arĝentaj** rakontoj: Pri spaco, spacveturado kaj eksterteruloj.

Ĉiu skatoleto enhavas **50 kartojn**; ĉiu karto estas por unu enigmo (mistero). Sur la antaŭa flanko troviĝas mallonga teksto kaj bildo pri iu okazaĵo. Sur la dorsa flanko staras pli longa teksto kun klarigoj kiel tio povis okazi.

En tiuj enigmoj la "konanto" laŭtlegas la etan tekston sur la antaŭa flanko, kaj montras la karton (kun la akompana bildo). Post tio la cetero de la grupo provas eltrovi kiel okazis tio kion ili ĵus aŭdis. Por tio ili starigas al la konanto demandojn (prefere mallongajn!) kiuj estas respondeblaj per "jes" kaj "ne".

Rob denove estos la "konanto"; li laŭtlegos la enigmojn. La aliaj ilin solvu.

Por vi la mistero **antaŭ** la klubkunveno estas: *kiun koloron li nun elektis?*

